

INTERNACIA  
PEDAGOGIA REVUO

---

**IPR**

Eldonata de Internacia Ligo  
de Esperanto-Instruistoj

**ILEI**

---

Jarkolekto 7

N-ro 3, 1977

Pizo, Italujo



enhavo

<i>Johano Ingusz</i> – Instruspertoj en esperantfakaj klasoj	49
<i>d-ro Mario Dazzini</i> – Kiu lingva solvo por Eŭropo?	62
<i>Giuseppe Casagrande</i> – «Muzikoterapio»	68
*** – Eŭropa internacia lernejo	70
*** – Statistiko pri esperanto-kursoj	70
*** – Rezolucio de la 11a Internacia Konferenco de ILEI	71

## instruspertoj en esperantfakaj klasoj

### Enkonduko

1. Kiam mi entreprenis en la jaro 1967 unuan fojon gvidi Esperantan kurson, mi jam havis la diplomon. La studadon ni komencis en la studjaro 1965-66. En la sekva jaro estis la UK en Budapeŝto, mi renkontis eksterlandanojn kaj konstatis, ke Esperanto estas taŭga rimedo por ekkoni eksterlandanojn. La gelernantoj kaj la gepatroj ankoraŭ memoris la kongreson, ĉar estis intereso je la kurso. En la sekva jaro – en alia lernejo – mi denove komencis instrui kurse nian lingvon. Dumtempe aperis ministeria dekreto, kiu rajtigis organizi tielnomantajn fakajn lingvajn klasojn, komence en la tria klaso. Tiamaniere Esperanto okupis sian lokon en la vico de la intrueblaj fremdaj lingvoj.
2. En Hungario du lernejoj ricevis la rajton devige instrui Esperanton. Unu el tiuj du lernejoj estis la lernejo, direktata de mi, persone mi, kiel instruisto. Nun funkcias jam la kvara lernejo, kaj la komencaj gelernantoj nun jam vizitas la sesan klason.  
Post mi komencis instrui la lingvon du gekolegoj, kiuj instruas en la tria, respektive en la kvara kaj en la kvina klaso.
3. En Hungario la deviga lerneja instruado komenciĝas en la sesa jaraĝo, kaj daŭras ok jarojn. Tiu estas la tielnomata baza lernejo, en kiu oni devige lernas la rusan lingvon, ekde la kvina ĝis la oka klasoj. La fakajn studobjektojn – matematikon, korpedukadon, lingvojn, kanton ktp – oni komencas en la tria klaso.  
La studhornombroj estas posemajne en la tria kaj la kvara klasoj 3 horoj, en la kvina, sesa, sepa kaj la oka klasoj 5 horoj.  
Sendepende de aliaj instruitaj lingvoj en la kvina klaso oni komencas lerni la rusan lingvon.
4. Ĝenerale en la fakaj klasoj oni kutimas elekti la gelernantojn laŭ ilia emo kaj talento.

Inter la tri paralelaj klasoj mi elektis interkonsente kun la gepatroj unu tutan klason por esti Esperanta klaso. La konsisto de la klaso – laŭ talento, gepatra edukadeco, profesio, financaj rimedoj – estis tute simila al aliaj klasoj. Mia lernejo estas en laborista kvartalo, la tri kvaronoj de la klaso kaj lernejo estas gefiloj de laboristoj, kiuj ĝenerale ne konas fremdajn lingvojn kaj ne povas helpi al siaj gefiloj en lingvostudado.

Du jarojn mi jam instruis Esperanton al ili, kiam komenciĝis la trijara eksperimento en kvin landoj por enkonduki Esperanton en lernejojn.

Nun estas kvar formoj en Esperanto instruado en la hungaraj lernejoj.



## 1. La formoj de la lerneja instruado de Esperanto

### 1. Kursoj

Tiu estas la tradicia formo de instruado eksterprograma. Krom la studhoroj instruas la anonciĝintajn instruistoj. La gelnantoj pagas malgrandan kotizon. Ili ricevis klasifikon, sed ĝi ne influas la rezulton de la atestilo.

### 2. Pionira fakrondo

En interkonsento kun la estraro de Asocio de Hungaraj Pioniroj oni povas organizi Esperantajn fakrondojn, kie la gelnantoj en ludaj formoj lernas la lingvon. La anoj de tiaj fakrondoj ricevis legitimilon de la Hungara Esperanto-Asocio, kiun ili metas en la pioniran legitimilon.

### 3. Eksperimentaj klasoj

Entute ekzistas 9 klasoj, 4 en Budapeŝto, 5 en provinco. Ili instruas la lingvon laŭ koordinata programo de la kvar partoprenantaj landoj. [Bulgario, Italio, Jugoslaviio, kaj Hungario].

La studhoroj enestas en la horaro kaj la gelnantoj ricevas klasifikon, oni kalkulas en siajn atestilojn.

### 4. Fakaj klasoj

Estas la plej serioza instruformo, kun alta studhombro. La studhoroj estas en la horaro kaj oni kalkulas la klasifikon en la atestilon.

Laŭ la lasta statistiko en tiuj ĉi kvar formoj en 83 lernejoj unuopoj — Klasoj, fakrondoj, kursoj — entute 1616 gelnantoj lernas Esperanton en Hungario. Mi okupiĝas en ĉi tiu skribaĵo pri la rezultoj kaj spertoj en fakaj klasoj.

Nun, je la fino de la tria lernoĵaro, kiam mi instruas devige Esperanton, oni povas jam konstati, ke Esperanto enigis en la vicon de studobjektoj. Oni taksas ĝin kiel popularan studobjekton, eĉ rekonas ĝin kiel tre bonan rimedon por ekkoni la vivon de eksterlandaj gelnantoj.

## II. Historia trarigardo

Jam en kelkaj landoj kaj en diversaj periodoj oni provis mezuri la efikon de la Esperanto — instruado. Mi nur mallonge mencias kelkajn rezultojn — laŭ la artikolo de Prof-ro I. Szerdahelyi. [Le lerneja instruado de Esperanto].

Jam en la Unua Kongreso en Bulonjo-sur-Marco, en 1905, Edmond Privat proponis la enkondukon de Esperanto en lernejojn. En tiu ĉi jaro en Francio memvolaj lernejoj kursoj funkciis.

Oficiale en Usono oni enkondukis en 1908 en Maryland-Posto oni instruis la lingvon en kelkaj germanaj, francaj, anglaj, rusaj kaj alilandaj lernejoj.

Post la unua mondmilito la Ligo de Nacioj je la 18-an de aprilo 1922 invitis la kompetentulojn de la edukado kaj la lingvoinstruado el 28 landoj.

La delegitoj citis la koncernajn registarajn dekretojn, kiuj reguligas la instruadon. En la dua tagorda punkto oni pritraktis la efikon de la Esperanto — instruado pri la instruado de gepatra lingvo. La efiko estas ĉefe bona en la vortfarado kaj la instruado de la ortografio. Surbaze de la raportoj de la inspektoroj, la brita edukmi-

nistro deklaris: la gelnantoj, kiuj lernas Esperanton, plibone parolas, konceptas kaj komprenas la gramatikon de la gepatra lingvo. La tria debatemis: la efiko de la lerneja instruado de Esperanto pri la kompreno de aliaj fremdaj lingvoj. La deputitoj deklaris, ke pere de lernado de Esperanto, la gelnantoj pli facile alproprigis la sistemon de indoeŭropaj lingvoj.

La klara tagorda punkto: la efiko de Esperanto pri la instruado de geografio kaj pri la edukado de la internacia kompreno kaj paco.

Ĉefe la korespondado estas taŭga por elformi la ekkonon kaj estimon de aliaj popoloj.

La konferenco prezentis siajn spertojn kaj rezultojn al la Ligo de Nacioj.

La Komisiono de Intelekta Kunlaboro en aŭgusto de 1923 pritraktis la demandon de Esperanto instruado, ĉar la ligo de Naciaj transdonis la rajton de dispono.

La Komisiono malakceptis la proponon, ke oni instruu Esperanton en lernejoj, sed rimarkis, ke la Ligo de Naciaj atentu la evoluon de Esperanto «kies agado povos efike helpi la kreadon de la morala unueco de la mondo, se sia disvastiĝo ĝeneraliĝos». Post la dua mondmilito en 1954-a konferenco de UNESCO en Montevideo pritraktis la kulturajn rezultojn de Esperanto.

## III. La valoro de Esperanto-instruado

1. Esperanto instruado havas en tri rilatoj valoroj:

- |               |            |
|---------------|------------|
| en pedagogaj  |            |
| en didaktikaj | vidpunktoj |
| en praktikaj  |            |

Esperanto-instruado helpas plivastigi la sanan internacian humanismon, la socialistan humanismon. Estas taŭga por komuniki la socian, materian kaj kulturan evoluon de aliaj nacioj. Pro sia logika gramatiko helpas la konsekvencon pensadon. Ni povas interkonsenti kun la deklaro de Prof-ro Rudolf Rakusa: «Esperanto estas perfekte taŭga, ke akcelu la pedagogajn celojn de la socialista lernejo». [Esperanto kaj Lernejo, Ljubljana, 1959.17.p.]

Esperanto-instruado helpas la lernadon de naciaj lingvoj kaj la gepatra lingvo.

2. La efikon de Esperanto-instruado je la fremdaj lingvoj oni jam eksperimentis kelkloke.

Por mi estas eble la plej interesa la eksperimento, kiun oni faris en finnlanda gimnazio, en urbeto Somero dum tri jaroj. Joel Vilki, direktoro de gimnazio, faris kun du klasoj eksperimenton.

La klaso C en la jaro 1958-59 po semajne en ses horoj lernis Esperanton. En la sekva jaro ili lernis krom Esperanto ankaŭ geografion esperantlingve kaj komencis lerni germanan lingvon. En la lernoĵaro 1960-61 apud la geografio ankaŭ la kanthorojn gvidis esperantlingve, kaj daŭris la instruado de la germana lingvo.

La klaso B ne lernis Esperanton, ekde la unua klaso lernis germanan lingvon.



La klaso C atingis en la tria jaro el germana lingvo la klason B.

La instruisto de la germana lingvo en sia raporto emfazis, ke la Esperanto-klaso estas multe pli vigla, pli kuraĝa, parolas pli memstare, la parolkapablo de la lernantoj estas pli evoluita ol en la paralela klaso.

Estas interesa sia motivado:

«La fakto, ke la lernado de Esperanto permesis al ili novan lingvon en interparolo kun la instruisto jam de la unua leciono, naskis en ili kuraĝon kaj memfidon. Ekster tio oni povas kun granda verŝajno pretendi, ke la kapablo akceptis novajn formojn de sinesprimo jam subkonscie helpas al ili la alproprigon de nova fremda lingvo».

Pri la eksperimento tiel deklaris Y. Ruutu, ĉe direktoro de la finna kultura ministerio: «La demando de enkonduko de Esperanto — Lingva Internacia estas tre interesa. Tiu povos esti tre utila, ĉefe al tiel malgranda lando, kiel Finnlando».

3. En la nuna [1971-72] lernojaro komenciĝis tri jara eksperimento de kvin landoj.

Laŭ la spertoj de ĝis nuna instruado en la mondo, oni povas starigi jenajn hipotezojn, kiujn oni povas dum la eksperimento, t.e. dum la instruado konfirmi, korekti, au rifuzi:

a. La lernado de Internacia Lingvo Esperanto helpas kompreni kaj orientiĝi en la strukturo de la gepatra lingvo.

b. La lernado de Internacia Lingvo Esperanto ebligas la plirapidan orientiĝon en la strukturo de fremda nacia lingvo.

c. La lernado de Internacia Lingvo Esperanto helpas al la kompreno kaj uzado de fremdaj kaj internaciaj esprimoj.

d. Paralela instruado de Internacia Lingvo Esperanto en la lernejoj de diversaj landoj kaj ĝia praktika aplikado ebligas al la lernantoj ampleksan kulturalan interŝanĝadon, konatiĝon kun larĝa spektro de literaturaj kaj intelektaj kreaĵoj de grandaj kaj malgrandaj popoloj, relative frue vekas la emon al la produktiva skribkapablo, en senperaj kontaktoj ebligas pli intime ekkoni aliajn popolojn iliajn vivmanierojn kaj aliflanke memfariĝi la ambasadoro de sia hejmlando.

e. Uzo de Internacia Lingvo Esperanto ebligas liberan kompreniĝon sen sento de malsupereco, vekas la konscion pri samvaloreco inter samaĝuloj alilandaj, formas la koncepton de internaciisto kaj paca kunvidado inter la popoloj kaj humanisman interkomprenon inter homaj kontaktoj.

4. Mi ŝatus konfirmi, ke tiuj hipotezoj estas veraj, efektivegeblaj.

Tiu ĉi laboraĵo intencas esti dokumento de tiu.

En mia instruado estas la komparo de Instruplano kaj Instrukcio.

Estas do la kadro, sur kies bazo mi povos instrui nian lingvon. Ekzistas Instrumeto kaj lernolibro, ambaŭ farita de Szerdahelyi.

Apogiĝinte al tiuj, mi faris mian instruplanon por la tria klaso, po semajne 3 horoj, entute 99 horoj. Mi planis fini la unuajn 6 lecionojn en la tria, 8 lecionojn en la kvara kaj la tutan lernolibron [24 lecionojn] en la kvina klasoj.

Nun, je la fino de la tria jaro, mi povas konstati, ke tiun planon mi povis plenumi. La plej bonaj gelernantoj bone komprenas, legas, tradukas Esperantan tekston, kaj ne ĉiam tute korekte, sed ili paroladas pri simplaj familiaj, aŭ lernejoj temoj. Ni havas ankoraŭ antaŭ ni tri jaran komunan studadon.

Mi esperas, ke je la fino de la oka klaso eĉ la plej maldiligentaj kaj malfortaj flue parolos buŝe kaj skibe nian lingvon.

### Metodo

Laŭ la Szerdahelyi lernolibro ni lernis, tre ludeme, multe ni ekzercis. En la komenco, en la tria klaso ĉiuj gelernantoj kunportis sian favoran pupon, urson, kaj la necesajn parolekzercojn ni faris helpe de tiuj ludiloj. «Kie estas urseto?». «Urseto estas sur la tablo.» ktp. La gelernantoj volonte rolas, pro tio mi ofte dramigis la legaĵojn. Apud la parolado mi klopodis instrui ilin bone legi kaj traduki. En la tria klaso je la mezo de oktobro ili donis la sekvan skribtaskon. El hungara en Esperanton:

Ĉi tie staras du brunaj hundoj. Mi estas hungara lernant[in]o.

El Esperanto en la hungaran:

Hungara instruistino instruas kaj parolas. Tri blondaj lernantinoj sidas kaj legas. Esperanto estas bela, facila lingvo.

23 gelernantoj atingis la subajn rezultojn:

11 gelernantoj ricevis	5
6 " "	4
5 " "	3
1 " "	2

La mezvaloro de la skribleciono estis 4.2.

Jam frue mi komencis, per la helpo de miaj eksterlandaj geamikoj, la komunan korespondadon kun eksterlandaj klasoj, kaj dum kristnasko ĉiuj gelernantoj salutis la gepatrojn esperantlingve per bildkartoj:

Kaŭzis problemon, ke la libro estis verkita por 10-14 jaraj gelernantoj. La II-an parton la kompletigajn klarigojn mi malmulte povis uzi: la gelernantoj ankoraŭ eĉ en gepatra lingvo ne lernis tiujn gramatikaĵojn.

Mi havis tre bonan kontakton kun klasestrino de la klaso, kiu donis al mi multan metodikan helpon al la instruado de tiaj aĝaj infanoj.

En la dua semestro mi jam povis sendi la suban leteron: «Karaj jugoslavaj geamikoj!

Ni ricevis vian leteron. Ni tre ĝojis pri ĝi. Ni volonte plenumas vian peton. Alsendu al ni ankaŭ manlaboraĵojn kaj desegnaĵojn.

Elkore salutas vin, viaj hungaraj geamikoj.»

Tiel mi planis, ke poĵare mi instruas 300 vortojn.

Mi faris por mi mem vortaron, surbaze de Szerdahelyi-libro, sed jam en la unua jaro mi konstatis, ke tiun sumon ni superplenumis.



Ĝenerale mi instruis laŭ la miksa studhormetodo, kies kutima skemo estas:

1. organizado de la studhororo [raporto, forestantoj]
2. Kontrolo de hejmaj taskoj  
skribaj                      tutfrontaj  
parolaj                      individuaj
3. Enkonduko de nova materialo, konversacio
4. Antaŭekzercado de la nova materialo
5. Legado kaj legaĵlaborado
6. Postekzercado kaj aktualigo
7. Resumo kaj desegnado de hejmaj taskoj: parola, skriba.

Memkompreneble, mi ne nur mikajn studhororojn instruis sed ankaŭ aliformajn.

Multe mi skribigis kaj tradukigis la gelernantojn. Posabate mi enkondukis la kutimon, ke oni rajtis demandi la nekomprenitajn gramatikaĵojn aŭ problemojn sen danĝero de la klasifiko. Tiam unue la pli bonaj respondis kaj se ne sciis la gelernantojn, klarigis mi. Nur montrante kiel modelon, mi citis kelkajn hejmtaskojn el la tria. kvara kaj kvina klasoj, poste kelkajn skribajn laboraĵojn.

### 3a klaso

#### 5. studhororo.

La hundo, la kato kaj la urseto estas bestoj. Jen du flavaj katoj, kaj unu hundo!

#### 29. studhororo

En ĉi tiu lernoĉambro lernas dudek kvin gelernantoj. Ĉi tie salutas la bonaj lernantoj.

#### 46. studhororo

La tago de la muso

La malgranda muso tuttage ludas kaj kuras. Ĝi manĝas kaj trinkas. La besteto nokte dormas. La blanka muso estas kara besto.

#### 67. studhororo

Mi komencis paroli kun mia amiko pri la libro, kiun mi hieraŭ legis.

#### 85. studhororo

Letero al fremda amikino.

### 4a klaso

#### 7. studhororo.

Kiam mia buŝo estas malpura, mi lavas ĝin. La buŝo puriĝis.

#### 14. studhororo.

La knabo ridetas, la instruistino ridas, la knabino ploretas.

#### 27. studhororo.

Vintre, se estas malvarme, mi ŝatus sledi kaj glitkuri.

#### 49. studhororo

Pri Budapeŝto [Konceptado]

Budapeŝto estas ĉefurbo de Hungario. La ĉefurbo estas tre bela. Ankaŭ mi loĝas en ĝi. Mi ŝatus koni en vidindaĵoj de Budapeŝto: Bastionon de fiŝistoj, banejojn de turkoj, teatrojn, la pontojn de Danubo, Margaretinsulon. Mia ĉefurbo havas dudekdu distriktojn, mi loĝas en la dektria distrikto. Ĉi tie estas multaj fabrikoj. Ĝi nomiĝas laborista distrikto.

Ankaŭ vi vizitu Budapeŝton!

#### 58. studhororo

Kion mi vidas sur la bildo?

En la banejo

Mi vidas banejon. Ili baniĝas naĝas. Mi tre ŝatas iri en banejon. Tie oni kutimas multe fari. Ekzemple: baniĝi naĝi, gimnastiki, ludi.

La malgrandaj infanoj nur naĝetas kaj ludas.

#### 72. studhororo

Mia patrino

Mia patrino nomiĝas: onjo Roza. Ŝi havas 32 jarojn. Ŝi estas 175 centimetrojn alta. Ŝi havas okulvitrojn - Ŝia hararo estas nigra ŝia vizaĝo ĉiam estas ĉarma kaj rideta. Ŝia kostumo estas ĉiam pura kaj konvena. Mia koro sufloras al mi, ke ŝi estas la plej bona patrino.

#### 93. studhororo

Mia somera plano

En la kvara klaso mi donis al la gelernantoj la subajn kvar skribajn lecionojn:

1. El hungara lingvo en Esperanton traduki kvin frazojn, kaj traduki kvar kunmetitajn vortojn. Ili ricevis po frazoj punktojn por la bona solvo kaj adiciite la punktojn ili mem kalkulis la konvenan klasifikon.
2. unu frazon traduki el hungara lingvo.
  - a. Traduki la sekvan frazon:  
Sed oni faras hodiaŭ ankaŭ el metalo modernajn meblojn:  
ankaŭ vi vidis jam breton el aluminio.
  - c. disigu la suban kunskribitan frazon: lanematurajfruktojestasverdajkajacidaj
  - d. traduku la subajn prepoziciojn:  
per kun tra, ĉe, en, al, sub, malantaŭ
  - e. skribu en tri frazoj, kion vi matenmanĝis, tagmanĝis hieraŭ?
3. a. Traduku la suban frazon: Survoje mi trinkis ion en la urblima trinkejo, ĉar mi ege soifis. Senlace ni daŭrigis la vojon ĝis la hejmo.
  - b. traduku el hungara lingvo:
    - a. kion signifas la subaj vortoj.  
pordego, belega, dolĉeta, ferisemajno, neĝejo, kutime
    - d. faru vortojn kun la subaj sufiksoj:  
-et, -eg, -ar, -ej, -an, -in,
    - e. skribu leteron al fremda amik/in/o pri nia lernejo:



4. a. Traduku la subajn frazojn:  
Kiam sinjoro instruisto klarigas la gramatikajn regulojn, ni ĉiam atentis. Ni jam scias nombri Esperante, ni lernis versaĵojn, fabelojn, ŝercojn, proverbojn, ni legis kaj tradukis multajn legaĵojn, diversajn tekstojn, ekzercojn, kaj ekzemplojn.  
b. skribu la enhavon de la legado «La vulpo kaj la vinbero».  
c. faru 3 demandojn al la legado «La amikoj kaj la pomo».

#### 5a klaso

#### 7. studboro

Pri la vizitado de profesoro Lapenna

Mi iris gaje en la lernejon. Mi sciis, ke ni havas gaston. Mi tre atendis la Esperanton-studhoron. La tempo pasis malrapide. Post gimnastikhoro jam ankaŭ miaj geklasanoj estis maltrankvilaj. Sonoris. Baldaŭ malfermiĝis la pordo kaj alvenis mia direktoro kun la gastoj. Unu gasto estis nekonata al ni, sed ni eksciis de mia instruisto, ke li estas sinjoro doktoro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA. Post la prezento ni komencis labori. Ni laŭtlegis niajn skribajn lecionojn, baldaŭ lube paroladis kune. Ĉiuj estis kontentaj. Ankaŭ sinjoro profesoro demandadis. Fino de studhoro nia gasto adiaŭis per kelkaj frazoj de ni.

Mi tre ŝatus eklerni Esperanton perfekte, por, ke jam povu ekkoni multajn eminentajn Esperantistojn.

#### 77-78 studboro

Kiel pasis mia vintra ferio? [Konceptado].

#### 102. studboro

Mia dimanĉa programo [Konceptado]

En la kvina klaso mi diferencis inter la gelernantoj La pli bonaj ricevis pli malfacilajn taskojn ol la aliaj.

La unua skriba leciono estis por la pli bonaj:

1. Letero al mia fremda amik[in]o pri mia hobbio, al aliaj tradukis kun la titolo: Mia dimanĉo.
2. Traduku el hungara lingvo en Esperanton kaj inverse.
3. Traduku la subajn frazojn:
  - a. La pionirorganizaĵo aperigas tri infangazetojn kaj unu revuon por gvidantoj. La centra presorgano estas la semajne aperanta «Pajtás», kies legantoj estas la pioniroj. La gazeto sciigas pri la eventoj de la internacia kaj enlanda vivo: raportas pri la agadoj de la pioniroj per spritaj agadoj helpas la laboron de la taĉmentoj kaj svarmoj. La infanleganto trovas en ĝi interesajn aventurojn, historiojn, bildromanojn, sportsciigon, enigmojn kaj eĉ ankaŭ humoraĵojn.
  - b. traduku 5 frazojn el Szerdahelyi: Esperanto I. libro.
4. Por la malfortaj mi donis taskon traduki el Graĵnoj en Vento, la pli bonaj ricevis pli malfacilan tekston.

La evoluo de iliaj scioj ne estis homogena. Post pli longaj ferioj ni devis ĉiam ripetadi la jam instruitan materion, ĉar ili rapide forgesis ĝin.

Okazis tipaj eraroj, kiujn oni povas grupigi en kvar grupojn:

- a. fonetikaj eraroj.
- b. laŭakcentaj eraroj.
- c. morfologiaj eraroj.
- d. sinteksaj eraroj.

#### a. fonetikaj eraroj

En Esperanto estas 28 sonoj. Ilia granda parto ekzistas ankaŭ en la hungara lingvo kaj tiel ili ne okazigas grandan malfacilaĵon al hungaraj gelernantoj. Sed inter la vokaloj estas «a», kiu estas uzata en hungara lingvo, sed la sonoj, kiujn ĝi signas en Esperanto, kaj en la hungara lingvo, ne estas samaj. La hungara «a» estas pli fermata, ol en Esperanto. Malfermi la buŝon pli granda, kaj prononci la vokalon pli mallonge, ol la hungara «A» ne estas facile al hungaraj gelernantoj, kiuj ankoraŭ parolas nur hungare. Tiuj vortoj estas ekzemple: la, kvar, oka, kia, kara, bela, ktp.

El la konsonantoj la «s» kaŭzas kelkajn malfacilaĵojn al la gelernantoj. Nome, en la hungara lingvo la literon «s» oni devas legi, kiel «ŝ». Post ekzercadoj tiu ĉi eraro malaperas. [Poŝtmarko. - post, ŝi, skribas, ktp.]

#### b. laŭakcentaj eraroj

En Esperanto, la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo, kaj en hungara lingvo ĉiam sur la unua silabo. La oreloj de la gelernantoj funkcias hungare, kaj ili diras ankaŭ la Esperantajn vortojn laŭ la hungara akcento. Al la hungaraj oreloj la plej facilaj Esperantaj vortoj estas la dusilabaj. En tiuj vortoj la hungara akcenta silabo koincidas kun la Esperanta akcenta silabo.

#### c. morfologiaj eraroj.

Esperanto apartenas al la indoeŭropaj, pli proksime al la neolatinaj, lingvoj, kaj la hungara lingvo apartenas al la, finnugraj lingvoj. Inter tiuj du lingvofamilioj estas granda diferenco, kaj la malfacilaĵoj devenas el tiu ĉi diferenco.

Kiam la subjekto de la frazo estas esprimata per du aŭ tri substantivoj en singularo / temas pri la kuntiritaj frazoj/ tiam la predikativo devas stari en pluralo.

Ekzemple: *Stefano kaj Nikolao estas knaboj. La tablo, la seĝo kaj la ŝranko estas mebloj. La rozo, la tulipo estas belaj, floroj.*

Tiun ĉi «j» en tiaj okazoj estas tre malfacila al hungaraj gelernantoj.

En la hungara lingvo mankas la akordiĝo de la adjektivo kun la koncerna substantivo.

Maria kaj Julia estas diligentaj lernantinoj.

Mi kolektas la belajn hungarajn poŝtmarkojn.

#### d. sintaksaj eraroj

En Esperanto el la primitiva frazo ne povas manki verba predikato, t.e. kopulo.



[kompreneble ne temas pri elipsa frazo].

*Paolo sidas. Esperanto estas lingvo.*

Hunŝarlingve: Az eszperanto nyelv. Lingvo = nyelv

En la hungara lingvo tiuokase ni ne uzas verbon. Al predikato ne apartenas verba parto.

[Mi dankas tiujn kvar erargrupojn al kolego Francisko Balogh, kiu kolektis ilin]

La efiko de Esperanto instruado je la kolektivo de la klaso

Kiam mi jam menciis, je la komenco de la klaso tria ni jam unue komune, poste individue korespondis, kaj korespondas kun jugoslavaj, francaj, germanaj, sovetaĵ geknaboj. Bedaŭrinde, tiujn ĉi leterojn mi ne povas aldoni, ĉar ili estas aŭ en la albumoj de la gelernantoj, aŭ en la komuna ekspozicieto de mia lernejo.

Ni ricevis magnetofonan sonbendon de Dollbergen kie rektoras s-ro Helmut Sonabend, prezidanto de ILEI. Per komuna sonbendo ni rekompencis tiun aŭfablecon, sur kiu ni fiksas la jenan programeton:

1. Himno de Esperanto Kanthoro.
2. Pri nia ĉefurbo Budapeŝto. [Skriba] konceptado.
3. Amika Rondo. Poemo.
4. Pri nia lernejo. [Skriba] konceptado.
4. Esperantlingvaj kantoj.
6. Tragedieto. Poemo de Kalocsay.
7. Pri la hungara kuirarto. Hungarecaj manĝaĵreceptoj.
8. «Koko de mia patrino». Poemo de Petöfi, trad. Kalocsay.
9. Esperantlingvaj kantoj.
10. Estas mi esperantisto. Poemo de Baghy.
11. Pri nia klaso. Konceptado.
12. Himno de Junularo. Kanthoro.

Komune kun la alia esperantfaka lernejo en Budapeŝto ni dufoje aranĝis komunajn kunvenojn kun programo.

La konscio de la esperantfakaj klasoj kreskiĝis, ke tiuj klasoj portas verdstelan insignon sur la lernejoj, aŭ sur pioniraj ĉemizoj. Tiu fakto ankaŭ helpis la disciplinemon.

Multajn komunajn ĝojojn alportis la Esperantaj kantoj kiujn ni kantis aŭ submarse antaŭ la instruado. Tiuj kantoj estis tiaj popularaj, ke eĉ la neesperantistaj klasoj lernis ilin.

Esperantan karakteron de nia lernejo signas ankoraŭ tri grandaj murbildoj, plenaj de esperantaĵoj.

Jam la duan fojon marŝis inter budapeŝtaj esperantistoj niaj gelernantoj je la Unua de Majo, okaze de granda festo de la laboristaro.

En nia lernejo gatis la universitatoj de la Esperanto-fako de la Universitato Eötvös Llorand. Miaj gelernantoj akceptis kun granda ĝojo la junajn kandidatojn, kiuj sukcesplene plenumis la pruvinstruadon.

Aldone mi prezentas la planon de la fininstruado de f-ino Eva Tofalvi.

## Fininstruado

Tempo: 21. IV. 1971.

Loko: Tomori strata ĝenerala 4.b. klaso [esperantfaka]

Studmaterio: Ripetado kaj sistemigo de instruitaj studpartoj pri la datoj [jaro, monato, semajno, tago, horo, minuto].

Didaktika tasko: Firmigo de la lernita studmaterio.

Eduka tasko. Eduko pri precizeco.

Gvidinstruisto: Johano Ingusz

Instruas: Eva Tofalvi, V. jara universitato pri hungara lingvo, bibliotekscienco kaj Esperanto, lingvo kaj literaturo.

Tipo de la studhoras: Ripetada — sistemiga studhoras

La divido de la studhoras

I. Organizado

II. Enkonduko: Pro kio estas grava, ke ni povu determini la datojn?

III. Ripetado, sistemigo:

Deiro: La skriba hejmtasko:

1. Ĉiutage mi kutimas ellitiĝi  
je la sesa kaj duono  
je la sesa kaj tridek  
je la duono post la sesa
2. Je la sesa mi matenmanĝas, kaj  
je la kvarono post la sepa  
je la sepa kaj dekkvin  
mi ekiras en la lernejo.
3. Je la sepa kaj tri kvaronoj  
je la tri kvaronoj post la sepa  
je la sepa kaj kvardek kvin  
mi estas en la klaso.

Instruista demando, la gelernantoj respondas.

La gelernantoj tiujn frazojn hejme tradukis en Esperanton. Nun la vokitaj gelernantoj laŭtlege la tradukon, unu lernanto surskribas la ĝustan solvon sur la tabulon.

Instruistaj demandoj:

Kiamaniere ni povas esprimi la unuopajn templimojn?

Kial? Ĉu ĉiu komprenas ĝin? Instruista klarigo surbaze de demandoj de la gelernantoj.

Legado — ekzercado

La tagordo — en la lernejo.

[ Lernolibro 85. - 86. p.]



Pridiskuto de eblaj problemoj.

Du lernantoj legas, tradukas. Dum la tradukado mi atendigas ilin pri la sciindaĵoj de la hungaraj lingvouzado, ili ne traduku fremdece.

La difino de la hejmtasko:

Ili skribu 4-5 frazan konceptadon pri unu tago de la ferio:

La titolo: Unu tago de la printempa ferio:

La titolon mi skribas sur la tabulon esperantlingve.

Subskriboj: Johano Ingusz gvidinstruisto

Éva Tõfalvi instruista kandidatino.

Mi aldonas salulkarton de lernantino, kiu jam en la tria klaso tiel bone kaj bele skribis el mi.

La aldonita hungarlingva invitilo-okaze de la centra Esperanto studhoron en la kvina klaso-invitis la instruistaron al amuza karnevalo, kies tutan programon la gelernantoj mem organizis.

Ofte vizitis niajn studhorojn en- kaj eksterlandaj gastoj, kiujn miaj gelernantoj tre volonte akceptis. Inter ili vizitis studhoron prof-ro Ivo Lapenna, iama prezidanto de UEA [pri lia vizitado vidu konceptadon], multfoje prof-ro Istvan Szerdahelyi kaj aliaj.

Kutime miaj gelernantoj partoprenas studajn konkurojn. En la lasta jaro la Budapesta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio aranĝis budapeŝtan konkurson.

Mi prezentas kelkajn tiajn demandfoliojn. El kelkaj miaj gelernantoj mi organizis fakrondon en la distrikta Pionira Domo. Ilia esperantlingva albumo atingis belan sukceson en la distrikta pionira ekspozicio.

En la sekva jaro oni aranĝos apartan organizadon por la esperantlingvaj pioniroj en Budapeŝto. En la Pionira Esperanto Klubo [PEK] ni kolektos la gelernantojn. Pojare 4-5 foje ni aranĝos laŭ la plano de la gelernantaro komunan amuzan posttagmezon, sportkonkurson, ekskurson, ekspozicion, ke estu ebleco uzi la lingvon kun gelernantoj de aliaj lernejoj.

Ĝisnunaj rezultoj, planoj kaj perspektivoj.

Ni faris kelkajn mezurojn, komparinte klasoj, kiuj lernis kaj kiuj ne lernis Esperanton.

En la hungaraj lernejoj oni komencas lerni la fakajn studobjektojn inter ili en mia lernejo Esperanton - en la tria klaso, kiam la infano estas okjara. La devigan fremdan lingvon, la rusan lingvon ili komencas lerni en la kvina klaso, kiam ili estas dekjaraj. Do en la esperantfaka klaso ili komencas la rusan lingvon post dujara esperantlingva lernado.

La rezulto de la rusa lingvo en la 5.a. klaso-gimnastikfaka, sen Esperanto - estas 3.7., en 5. esperantfakaklaso estas 4.4 [La plej bona klasifiko en la hungaraj lernejoj estas 5.].

En la hungara lingvo ne ekzistas prepozicioj. En ĉiuj aliaj indoeŭropaj lingvoj oni uzas prepoziciojn.

En 5.a klaso estis tre malfacila tasko por la instruisto komprenigi la uzadon de la prepozicioj en la rusa lingvo. En la 5.b. klaso tiu fakto estis jam memkomprenebla por la gelernantoj.

La sama situacio estas kun la uzado de genitivo. La vicordo de la genitivo en la hungara lingvo estas ĝuste inversa kompare al aliaj lingvoj. Tiun fakton ankaŭ tre malfacile komprenis en la 5.a. tre facile en la 5.b. klasoj.

La uzado de genitivo en la rusa lingvo estas simila al Esperanto. Do, kompreni la vicordon de la genitivo en la rusa lingvo, estas facila tasko por la esperantfakaj klasoj.

Ne parolante pri la konjugacio, kies diferenco estas malkomprenebla.

Ni faris komparon en tiuj ĉi du klasoj.

Ili estis devigitaj el memoro surpaperigi rusajn vortojn dum 15 minutoj.

En la 5.a (neesperantista) la plej bona lernanto skribis 58, en la 5.b. (esperantista) la plej bona lernanto skribis 71 rusajn vortojn.

La malpli bona lernanto en 5.a. klaso skribis 15, la malpli bona en la 5.b. klaso skribis 37 rusajn vortojn.

La meznombro en 5.a. klaso estas 36, en 5.b. klaso estas 52 vortoj.

Finfine, citaĵo el la protokolo de sinjorino fakinspektoro Szegő Ferencné, notita je la 26.a de marto 1972.

«En la du klasoj mi faris mezuradon, el kiu oni povas konstati, ke la rezultoj de Esperanto - faka klaso estas esence pli bonaj. En la klaso 5.b. (esperantista) (esperantista) la skribrapideco de la gelernantoj estas pli alta, aspekto de iliaj pli ordaj skriblaboraĵoj.

En alia 5 klaso estis la duobla la mezvalora erarnombro, la meznombra laborprodukto, estis 67 procentoj, kaj en la esperantfakaklaso 5.b. estis 87 procentoj.

Ankoraŭ pli granda estis ĉe la gelernantoj la diferenco inter la frazanalizado, tiu estis ĉirkaŭ 25 procentoj.

Tiuj ĉi diferencoj montris vidige, ke la kroma lernado de alia lingvo posemajne en kvin studhoroj, kiel efike povas evoluigi la scion de la gepatra lingvo «Mi scias ke tiuj mezuroj, tiuj rezultoj estas ankoraŭ tre modestaj. Tamen, signas la vojon, sur kiu mi-kune kun miaj gekolegoj - devos sekvi, intruante la internacian lingvon.

Johano Ingusz



# kiu lingva solvo por eŭropo?

## Esperanto en la nova Eŭropo — fronte al la eŭropaj elektoj dum 1978.

La temo, kiun oni destinis al mi kaj pri kiu mi devas raporti, estas «*Esperanto en la nova Eŭropo fronte al eŭropaj elektoj dum 1978a*», sed ĝi povus havi ankaŭ la subtitolon «*Kiu solvo por Eŭropo post 1978a: plurlingvismo, dulingvismo aŭ unu nura lingvo?* ».

Mi opinias ke neniu malatentis, ne eĉ tiuj kiuj estis ĉiam supraĵuloj pri Eŭropo, la daton 1978 kiel jaro de eŭropaj elektoj precipe en Italujo, kiu estis la unua lando kiu ratifikis la traktaton de la naŭo por la elekto de eŭropa parlamento en 1978.

Kiuj estas tiuj *naŭ* kiuj formas la estontan Eŭropon? Italujo, Belgujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Britujo, Irlando, Luksemburgujo kaj Nederlando, kun 256 milionoj de enloĝantoj.

La Eŭropa Komunumo, laŭ enloĝantoj, estos post Ĉinujo (800 milionoj), sed antaŭ Sovetunio (248 milionoj), Usono (211 milionoj) — ciferoj rilatantaj al 1972-73; dum laŭ areo (1.530.000 km<sup>2</sup>) estos kvara kompare kun Ĉinujo (2.597.000) Sovetunio (22.500.000 km<sup>2</sup>) kaj Usono (9.365.000 km<sup>2</sup>).

Ĉiuj landoj kiuj formas ĝin estas demokrataj, kun parlamentoj kaj pluraj partioj, sed kun diversaj ŝtataj organizoj: 4 respublikoj (Italujo, Francujo, Germanujo kaj Irlando) kaj 5 monarkioj (Britujo, Nederlando, Danlando, Belgujo, kaj Luksemburgujo).

Pluraj estas la lingvoj parolataj en la Komunumo: itala, franca (Francujo, Belgujo kaj Luksemburgujo), germana, angla (Britujo kaj Irlando), nederlanda, dana, flandra (Belgujo); al tiuj-ĉi oni devas aldoni: gaela (en Irlando kaj Skotlando), kelta (Kimrujo), romanĉa (alpaj valoj de Italujo) kaj leceburga; sep ĉefaj lingvoj kaj kvar pli malgrandaj aŭ malpliuzataj lingvoj.

Enpenetrante en la temon, en la kernon de la temo, kiu kvankam esence eduka kaj lingva, estas ankaŭ socia, mi devas reveni al la 1973.02.27, kiam Profesoro Henri Janne, tiam Ministro pri Nacia Edukado en Belgujo, prezentis al la komisiono de Eŭropa Komunumo, la raporton en kiu oni kolektis kaj klarigis la elementojn de komunuma edukpolitiko kaj oni precizigis kaj indikis la celojn kiujn devus trafi estonta komunuma edukpolitiko kaj oni elektis ilojn kaj vojojn, kiuj ebligis la realigon fare de la komunumo. Profunda, ĝenerala prikonsidero de la raporto mem, alportus min for de la temo kaj ekster la tempolimoj kiujn oni donis al mi por skizi kaj pritrakti kontentige la problemon, kiu nepre estas lingva. Pro tio mi haltos kaj speciale pritraktos unu el la specifaj celoj de la komunuma edukpolitiko, unu el la fundamentaj faktoroj por la Eŭro-

pa formiĝo: la kapablon komuniki buŝe kaj skribe flanke de estontaj eŭropaj civitanoj.

Sed, se inter la personuloj kiujn konsultis prof-ro Janne, la akordiĝo estis unuanima pri la rekono ke la komunumo devos agi por pligrandigi la povon de komunikado kiam ĝi dependas de la lingvoj, plibonigante la instrunivelon ne nur en la lernejoj sed ankaŭ meze de la plenkreskuloj, la malakordoj ekaperis pri la politikaj vojoj de la komunuma partopreno; tio estas pri la elekto de la lingvoj.

Rekonante ke jam ne plu eblas ke la estontaj eŭropaj civitanoj, lernu la ĉefajn 7 lingvojn de la Komunumo, ekestas la problemo pri la elekto de unu aŭ du lingvoj maksimume, kiujn devus studi 50 milionoj de eŭropaj gelernantoj kaj kiujn oni devus enkonduki kiel vehiklilon por la interkompreno inter la popoloj de la Eŭropa Komunumo.

Prof-ro Giuseppe Tramarollo, Vicprezidanto de itala sekcio de AEDE, en sia raporto «*La Eŭropo de la lingvoj*», ĉe la kunveno aranĝita de la Urbestro de Campione d'Italia, en oktobro 1974, asertas ke *tiu-ĉi Eŭropo, Babelo de lingvoj, ankoraŭ ne trovis interkomprenilon komunan kaj oni ne trovis ĝin ĉar mankas politikita volo elekti iun ajn solvon.*

El raporto Janne aperas tri diversaj tendencoj, malpli malakordiĝeblaj ol kiel oni povas pensi: *La unuj, sub la gvidado de la angloj, opinias ke oni devas akcepti kiel «duan» lingvon, tiun lingvon kiu ĝuas pli grandan diskonigon en Eŭropo kaj en la mondo, tio estas la angla, kiu devus fariĝi komuna lingvo en la Eŭropa Komunumo.*

Aliuloj, sub la gvidado de la francoj, opinias ke *la franca kaj la angla lingvoj devas esti sur la sama nivelo, kiel duaj eŭropaj lingvoj.*

Tria grupo fine, substrekas ke *sola solvo politike akceptebla en Eŭropo, kie oni rekonas la pozitivan valoron de naciaj kaj kulturaj diversecoj, estas permesi kaj starigi liberan elekton de la studo de fremdaj lingvoj (ne nur de la lingvoj de la Eŭropa Komunumo).*

Prof-ro Janne mem opinias ke *oni devas akcepti kiel principon la liberan elekton, sola, reala kaj demokrata starpunkto kiu povos utili kiel bazo al partopreno — ne kontestata — de la komunumo, celanta plenumi pozitive la esprimintajn necesojn.*

La raporto Janne, kvankam tre lerte redaktita, ne sukcesas kaŝi la rompojn ekzistantaj inter la demanditaj personuloj pri solvo de problemo pri elekto de unu aŭ pluraj lingvoj de la komunumo kaj klare montras ke la problemo havas politikan karakterizon kaj ke la politikistoj estos en grava embaraso por fari elekton kiu, kiel ajn okazu, ĉiam estos perfido por la popoloj de la komunumo kies nacia lingvo estos oferata sur la altaroj de Eŭropa unuiĝo, kaj estos imperiisma konduto kaj politika novkoloniismo kiun malfacile oni sukcesos pravigi kaj akceptigi de popoloj, kies lingvoj, tio estas kulturoj, malrapide estos destinataj sufokiĝi kaj poluciĝi perforte fare de unu aŭ du lingvaj kaj kulturaj strukturoj de aliaj popoloj.



Ankaŭ prof-ro Tramarollo en sia raporto pri «*La Eŭropo de la lingvoj*». rekonante ke *lingvaj diferencoj estas obstaklo al la unueca evoluo de la komunumo* (253 milionoj de Eŭropanoj de la Komunumo kiuj havas 7 lingvojn, kompare al 241 milionoj de Sovetanoj kiuj havas unu nuran oficialan lingvon, la rusan, kiun oni devige lernigas en la lernejoj al 100 milionoj de personoj kiuj ne uzas ĝin kiel gepatran lingvon, kaj kompare al 203 milionoj de Usonanoj kiuj parolas unu solan lingvon) opinias ke ekzistas tri solvoj de la lingva problemo en Eŭropo:

- 1) Elekto de unu el la 7 lingvoj de la komunumo, lernata kiel dua lingvo en la lernejoj de la aliaj 6 landoj; evidentigas la privilegio donita al la lando kiu uzas tiun lingvon kiel gepatran kaj kiu povus gvidi al vera *lingva imperiismo*;
- 2) La plurlingvismo, tio estas lernado de dua diversa lingvo inter la tri lingvoj plej disvastigitaj en la teritorio kaj lernado de tria lingvo por tiuj kiuj parolas malpligrandan lingvon.
- 3) Elekto de neŭtrala helplingvo, simpla sed taŭga por esprimi ĉiujn nuancojn de la esprimmaniero, facile lernebla ĉar bazita sur leksikaj radikoj de la sep lingvoj de la komunumo, ĉiuj apartenantaj al la hindeŭropa grupo. Estas la solvo prezentita flanke de la esperantistoj.

Sed ankaŭ prof-ro Tramarollo ne emas fari decidan elekton, nek por unu sola lingvo, nek por internacia lingvo esperanto, kaj li estas konvinkita ke plurlingvismo estu necesa, kia ajn estu la solvo adoptita en la komunuma teritorio.

Prof-ro Giovanni Freddi de Venecia Universitato «Cà Foscari», en eseo pri «*Lingva komunikado en Eŭropo*», asertas ke *Eŭropaj politikuloj ŝajnas konsciigi ke inter lingvo kaj ĝia kulturo ekzistas kunligoj tiaj ke altrudi perforte propran lingvon ankaŭ nur kiel vehiklilon, certgrade similas al perforte altrudi propran ideon pri la mondo, proprajn viv- kaj pensmanierojn kaj lastanalize, proprajn aĵojn!*

Li konscias pri la danĝero reprezentita por la procedo de Eŭropa integriĝo de Eŭropo de la lingvoj, kaj li estas konvinkita ke *privilegio lingvon povas signifigi privilegio ĝian kulturon kaj sekve humiligi la aliajn lingvojn-kulturojn*, kaj aldonas ke *tio estus kulpa blindeco, ĉar ĉiu grupo havas la rajton konservi propran lingvetnan identecon, ĉar ja plurlingvismo estas valoro al kiu oni ne povas rezigni*.

Sed ankaŭ prof-ro Freddi, kvankam li rekonas ke *la instrumentan valoron de la proponoj de la tiel divitaj artefaritaj lingvoj kiel esperanto, interlingvo ktp., oni ne povas subtaksi kaj mistaksi ilian etikan signifon*, precipe fronte al la timo ke *lingvo historia-natura kiel komunikilo internacia fariĝu ruza formo de novkoloniismo, de subpremado kaj perforto* ne havas la emon akcepti la solvon Esperanto, kaj tio pro la fakto ke, li diras, *tre baldaŭ oni konstatus diferencigon kaj difinon de pluraj esperantoj kiom estas la grupoj kulture samspecaj kiuj adoptus tiun lingvon*.

Tie ĉi mi ne volas argumentadi por rebati la asertojn de prof-ro Freddi, ne eĉ kiam li asertas ke *se tamen oni konsideras la problemon de lingva interkomun-*

*ikado de totala horizonto, aspektas ne tro realisme ipotezi la ĉeeston je ĉiuj niveloj, komunikaj kaj esprimaj de artefarita lingvo «vehikla» apud historiaj naturaj lingvoj: inter vehiklilo kaj enhavoj (kulturaj antropologie konsiderataj) estiĝas ĉiam kunligoj de interago kaj de reciproka influo.*

Kaj tiel eĉ rekonante ke *konsciante pri la internaj kvalitoj de logiko, esprimefiko, neniu historia nacia lingvo havas la rajton ke oni preferu ĝin al la aliaj, tamen necesas akcepti la elekton de unu historia nacia lingvo, lasante ke la politikistoj elektu, ne la lingvistoj, kaj tio ne nur je komunuma sed eĉ je monda nivelo!*

Pri la lernado de lingvoj en la estonta Eŭropo, prof-ro Mario Bastianetto, prezidanto de itala sekcio de AEDE, en sia raporto pri «*Eŭropo kaj eduka eŭropa politiko*», al la 6a Eŭropa Kongreso de AEDE, asertas *kiu estas teknika problemo, celanta la akiron de eŭropa konscio — oni ne povas ne ripetadi ke ĉiuj lingvoj, samkiel ĉiuj kulturoj, havas egalan dignon, sed post tiu-ĉi premiso, oni ne povas ne rekonu ke, fakte, tri lingvoj de la komunumo superas la aliajn, kio estas angla, franca, germana. La civitanoj parolantaj angle, france kaj germane havos sendube avantaĝon kaj kompensas tiun avantaĝon lernante, kiel duan lingvon, tiun parolata de la ĉefa enmigrinta grupo, laŭ belga sugesto. Por aliuloj, unu el la tri lingvoj devos esti lernata ekkomence en la unuagrada lernejo kaj la dua lingvo estos aldonata dum la fina trijara periodo de la duagrada lernejo, dum kiu, krom la due elektitaj lingvoj, oni devos ankaŭ studi la kulturojn kiuj rilatas al la du lingvoj.*

Tiu ĉi lasta tezo el la itala sekcio de AEDE kiu ankaŭ pledis pri *dungo de lektoroj kaj instruistoj gepatrlingvanoj*. «Por la «lokaj» instruistoj estas antaŭviditaj kiel necesaj kelkaj iniciatoj, kiel restado dum minimume unu monato ĉe kulturaj institucioj de landoj kies lingvon oni instruas; restadaj kursoj en gepatra lando, pri parolata lingvo kaj regula uzado didaktika de la periode aperantaj publikitaĵoj pri la instruenda lingvo.

Oni devas rekonu grandan sincerecon de prof-ro Bastianetto en la solvo de la lingva problemo en la Eŭropa Komunumo: du lingvoj devigaj, post la elekto, inter la tri lingvoj pli disvastigitaj: angla, franca, germana. Sed tio kio kompletigas la bildon, estas la pledo de la itala AEDE-sekcio pri deviga studado de la du kulturoj apartenantaj al la dulingvoj. Do, ne plu nur simpla uzado de lingvo kiel vehiklilo, sed deviga altrudo de du lingvoj kaj kulturoj al la aliaj popoloj de la Komunumo. Ĉu tiu-ĉi estas egalrajteco, egaldigno kaj demokrata sistemo por solvi problemon? Kaj fine, ĉu tiu solvo ne estos nova formo de novkoloniismo, lingva kaj kultura imperiismo, subpremado?

Mi volis prezenti sufiĉe ampleksajn partojn de la raporto de Janne, Tramarollo, Freddi kaj Bastianetto por doni ideon pri la pozicio de lingvistoj kaj studemuloj rilate la problemon de elekto de oficiala lingvo de la Komunumo.

Kiuj povas esti la perspektivoj de esperanto je la starto de la formiĝo de la Komunuma Eŭropo? Ne konsiderante ke esperanto, kiel universala lingvo,



laŭ strukturo kaj difino, suferus je «*diminutio capitis*» se oni elektus ĝin kiel vehiklan interkomprenilon de grupo de popoloj kiuj, kvankam unuiĝintaj en federacio, nepre organiziĝos en «eŭropa nacio» kaj, vole nevole, estos sub la influo de naskiĝinta eŭropa nacio» kaj, vole nevole, estos sub la influo de naskiĝinta eŭropa naciismo, oni ne povas ne konsideri la utilon de esperanto ne nur kiel vehikla interkomprenilo, sed ankaŭ kiel kompara lingvo por la necesa kaj dezirata kono de gepatra lingvo de ĉiuj popoloj kaj por pli facila lernado de historiaj naturaj lingvoj, eĉ de tiuj uzataj de la orientaj popoloj. Krome ĝi povos utili por la edukado al internacieco, tio estas al packunvivado, al kiu neniam historia natura lingvo povos eduki, ĉar ĝi alportas tradiciojn, vivmanierojn apartenantaj al iu specifa popolo, do naciaj!

Se esperanto havus je dispono la financrimedojn kiuj estas je dispono de franca kaj angla lingvoj por ilia propagando kaj disvastigo, oni ne plu havus dubojn pri la elekto de esperanto kiel vehikla interkomprenilo en la Eŭropa Komunumo. Malgraŭ la grandega forto kiun la esperantistoj ricevas de la konvinko ke ili posedas «solvon» vere validan, modernan, taŭgan, jam provita dum 80 jaroj de praktika uzado, de la problemo de interkompreniĝo inter la popoloj kaj ke ĝi estas la sola, vera solvo de lingva problemo ne nur eŭropa sed monda, esperanto ne havos multajn ŝancojn en la eŭropa kampo, ĉar elektos la eŭropan lingvon 410 deputitoj de la nova eŭropa parlamento kaj preskaŭ certe, por eviti la frontan frapon inter angla kaj franca lingvoj, oni favoros formale plurlingvismon, bazita sur instruado de ĉiu ajn historia natura lingvo kiu estos petata, sed efektive oni elektos anglo-francan dulingvismon aŭ anglan monopolon, pasive akceptata kaj tolerata de la aliaj popoloj de Eŭropa Komunumo.

Esperanto, vole nevole, reprezentos ĉiam opozicio kaj alternativo al ĉiu solvo bazita sur la principo de diskriminacio favore al unu ajn nacia lingvo kaj spite al malestimo kaj malŝato de multaj, tute ne informitaj, ĝi progresas, malrapide sed konstante, konkerante ĉiam pli gravajn poziciojn en la scienca kampo.

La esperantistoj volas akuzi aŭ juĝi neniun kaj nenion: sed ili nur demandas kiamaniere oni pensas respekti la homajn rajtojn, kiam oni pretendas «devige» kaj «perforte», ankaŭ se «leĝe», trudi la uzadon en la Eŭropa medio, de nacia lingvo, ekzemple angla aŭ franca, kiel internacia lingvo.

Tio signifos, se lingvo estas sinonimo de kulturo, subpremado, fare de unu nura lingvo kaj kulturo, de ĉiuj aliaj lingvoj kaj kulturoj en la estonta Eŭropo!

Se oni volos pravigi tiun decidon kaj tian solvon de la problemo, pere de la tiel dirita *supera ŝtata intereso*, tio ne konvinkos la esperantistojn kiuj celas al respekto kaj defendo de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj kaj kiuj laboras por atingi la egalecon de ĉiuj popoloj, grandaj kaj malgrandaj, fortaj kaj malfortaj, po-

tencaj kaj malpotencaj, laŭ la vidpunkto de lingva interkomprenilo.

Antaŭjuĝoj kaj nescio pri esperanto ne helpas la respondeculojn de estonta Eŭropo ne nur en la lingva sed ankaŭ en la homa integriĝo de Eŭropo.

Pro tio la esperantistaro kaj specife la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ne registara faka internacia organizaĵo, petas ke la estontaj eŭropaj instruistoj, la organoj de la Eŭropa Komunumo, kaj la deputitoj de Eŭropa parlamento, klopodu akurate kaj objektivite ekzameni la solvojn oferitajn de internacia lingvo-esperanto, la avantaĝojn, ekonomiajn kaj sociajn, kiujn la popoloj povas ricevi per tia solvo, la jam akiritajn rezultojn en la lerneja kaj eduka kampo, en harmonio kun principoj de libero, demokratio, justeco, kiujn ĉiu respondeca homo devas sekvi kaj respekti en sia vivo.

Mario Dazzini.



# «muzikoterapio»

muziko kiel ilo terapeŭta kaj eduka

En Bolonjo (italingve: *Bologna*) okazis lastatempe kunveno de «muzikoterapio», dum kiu oni celis certigi kion atingis lastjare la faritaj traserĉoj de unuopaj Italaj Grupoj tiufakaj. Krome, necesis decidi en kiu direkto plitaŭgas nun movigi la novajn esplorojn; ĉi-tie, tamen, mi nur mencias skize la pritrakitajn temojn, por simpla orientigo: eventualaj resumoj de unuopaj prelegoj peteblas rekte al *Associazione Italiana di Musicoterapia (via Petroni 9, i-40124 Bologna, Italujo)*.

La muziko estis ĉi tie utiligita por helpi al integrigo psika de uloj iel malhelpataj, aŭ kiel rimedo por personeoj malfacile akcepteblaj al socia kunvivo; tiuj situacioj renkonteblas ambaŭ ne malofte ankaŭ en normalaj lernejoj, kvankam en malpli intensa formo.

Al la enkonduka parolado de la neŭropsikiatra kuracisto d-ro prof. *Guaraldi* (legu: Gŭaraldi), prezidanto de la Italaj Grupoj, sekvis la raporto de la vicprezidanto d-ro Ĝan-Luiĝi *Zucchini* (legu: Zukkini), pri la partopreno de italaj kontribuantoj al kongreso de muzikoterapio okazinta pasintjaraj fakaj renkontiĝoj, kiuj okazis en Italujo. Oni informis krome pri la libro kunmetita de d-ro *Zucchini* mem, titolita «Maladaptiĝo kaj muzika animiĝo» (eldonejo: *Guaraldi*, Florenco): temas pri volumo entenanta kolekton de raportoj prezentitaj dum la unua itala seminario de muzikoterapio, okazinta antaŭ du jaroj. Verŝajne tiu libro estas komprenebla ankaŭ por fakuloj, eĉ sensperte pri la itala lingvo, sed scipopantaj esperanton.

Sekvis raporto de d-rino Anna *Cappello* (legu: Kappello) de Bolonjo, pedagogo, kiu prezentis sinteze la eksperimentadon kiun ŝi faris en instituto de lernantoj kun gravaj handikapo. Ŝi notigis la rezultojn, akiritajn per utiligo de muziko en formo ne nur pasiva sed ankaŭ aktiva, kaj precipe kreiva.

Prof-ino *Angeli* (legu: A'nĝeli) de Romo raportis pri eksperimentok kiujn ŝi kondukis ĉe frenezulejo en Romo.

Ŝi laboris ĉefe per korda instrumento, de ŝi aparte kreita tiucele, kaj kiun ŝi nomis «novan liron»; ĝia sono estas aparte fragila kaj delikata. Poste ŝi ilustris ankaŭ aliajn flankojn de la terapeŭta tehniko, nome tiujn kondukitaĵoj kun prof. *Gindro* (legu: Ĝindro). En la samaj estis asociitaj al muziko ankaŭ dramatismo, desegno, danco, ktp. Ĉiuj ĉi aktivecoj estis gvidataj de fakaj spertuloj; sed sub konstanta kontrolo de kuracistoj. La grupo de Kremono prezentis serion da muzikaj komponaĵoj kreitaj ĝuste por helpi personojn kun fortaj malfaciloj en parolkapablo, aŭ de vorta interkomunikado. La muzikaĵoj helpis al superigo de tiuspecaj obstakloj, kaj atingis bonajn rezultojn. Krome, sama meto-

do povas sperti novajn vojojn al la utiligado de fonika vojo; fakte ĝi kondukas eĉ al flua vorta komunikado pere de la kanto.

Fine, prof. *Ginevra* (legu: Ĝinevra), startinte el la studoj publikigitaj de d-ro *Zucchini*, informis pri ilia aplikado kaj plua kompletigo de la samaj eksperimentoj okazintaj kun bonaj rezultoj ĉe hospitalo Gaslini en Ĝenevo. Li raportis tre riĉe pri la diversaj sinsekvaj ŝtupoj de bone organizita muzika terapio. La unuopaj reagoj al bone kunmetita serio de sonoj kaj bruoj estis skribitaj de la demandito mem pere de la demandaro, sekve precize rekontrolebla.

Konkludis la kunvenon la prezidanto prof. Guaraldi, la nacia sekretario Klaŭdjo *Cavallini* (legu: Kavallini) kaj d-ro *Zucchini*, skizante mallonge la programon de baldaŭa laboro: programo plenigenda ĝis la renkonto de «muzikoterapio» okazinta en Asizo (*Assisi*), Italujo, de la 3a ĝis la 6a de marto 1977. Poste ili anoncis ankaŭ la probablan eldonon de kajero pri la laboroj realigitaj dum la pasinta jaro, kun aldono de bibliografio, de utilaj adresoj, k.s.

Fine oni avertis pri eventuala starigo de kurso propedeŭtika al muzikoterapio, dum venonta aŭtuno, kiel konkludo de serio de lokaj seminarioj en la diversaj regionoj.

G. Casagrande



## eŭropa internacia lernejo

En la belga urbeto de S.ta Ĝerardo, okazis ĉijare io, kio ne estos facile forgesata: ĉirkaŭ 170 infanoj el kvin landoj kunvenis en la tiea junulargastejo, akompanitaj de siaj geinstruistoj kaj pluraj gepatroj, por partopreni la modelan **Eŭropan Internacian Lernejon** de la dua regiono de Ilei.

La landoj estis Germanujo, el kiu venis al S.ta Ĝerardo 52 infanoj, Francujo, kun 18 lernantoj, Nederlando kun 48, Jugoslavujo kun 14, kaj Belgujo, kun la infanoj de la lernejo de S.ta Ĝerardo mem, kun ilia lernejestro s-ro Sondervost, kiu rolis ankaŭ kiel estro de la **Internacia Lernejo**.

Pri la eksperimento, estas jam planata la apero en la **Internacia Pedagogia Revuo** de specifaj fakaj artikoloj, verkitaj de diversaj specialistoj.

## statistiko pri esperanto-kursoj

Ni certas, ke ĉiuj niaj legantoj jam perfekte informitas pri la lastatempa evoluo de la rilatoj inter Uea kaj Unesko, kaj ĉi-tie ni ne parolus pri ili, se ne estus interesa flanko ankaŭ por Ilei, Tiu intereso nia rilatas al la propono, kiun Uea faris al Ilei, en la interkonsento pri kunlaboro, zorgi ĉiujare pri internacia statistiko pri la **Esperanto-kursoj**; jam ĉijare tia enketo estis provita, per specialaj enketiloj aparte distribuitaj al la sekciestroj de Ilei, el kiuj nur parto revenis plenigita — ĉijare, por atingi plej bonan rezulton, ni planas enmeti ekzemplerojn de la enketilo en la **Internacia Pedagogia Revuo**, tiel ke ĉiu membro povu persone respondi pri la kursoj, pri kiuj li informitas.


Por ke tiu ĉi nia **internacia statistiko** havu veran valoron por Esperanto, estas kompreneble bezonate, ke ĝi ampleku fakte la grandan plejmulton de la kursoj efektive starigitaj, kaj ke ĝi estu detale preciza rilate al pluraj aspektoj de la problemo. Pro tio, ni afable petas vin jam de nun teni vin informita pri ĉiuj kursoj de Esperanto (diversgradaj) kiuj oni aranĝas en viaj ĉirkaŭaĵoj, tiel ke vi pretu tuj resendi plenigitaj la enketilojn, kiuj vi trovos en la venontaj numeroj de **Internacia Pedagogia Revuo**.

## rezolucio

## de la 11a internacia konferenco de Ilei

aprobata de la Komitato de ILEI la 23an de julio 1977.

- La partoprenantoj el 13 landoj al la 11a internacia konferenco de ILEI, kunvenantaj ĉe Holiday Inn en Luksemburgo, de la 14a ĝis la 24a de Julio 1977a
- sekve de la kontaktoj kun la ministeriaj instancoj, urbaj kaj sindikataj reprezentantoj;
  - post atenta pritrakto de la lingvaj problemoj en la socio de la Eŭropa Komunumo;
  - akceptis unuanime la decidon de Unesko ke ILEI estu en C-kategorio;
  - petis la edukinstancojn de Luksemburgio ke oni starigu eksperimentan kurson pri esperanto almenaŭ en unu klaso de iu elementa lernejo de la lando;
  - petis la urbestron de Esch-sur Alzette ke oni eksperimente instruu esperanton en unu klaso de elementa lernejo de la urbo por ke ĝi post du jara studado, partoprenu la internacian lernejon de ILEI;
  - decidis formi laborkomisionojn;



La Luksemburga kastelo «la tri glandoj»



1. por ĝisdatigo en la instrumentoj kaj lernolibroj;
  2. por preparo de reĝlamento pri organizado de ILEI-konferencoj kaj seminarioj;
  3. por pristudo de sciencaj rezultoj de eksperimentoj en regiono I kaj 2;
  4. por partopreno al la projekto pri Asociaĝintaj Lernejoj de Unesko;
  5. por preparo de Internacia Simpozio pri interlingvistiko por scienca kontrolo de Esperanto ĉe Universitato Eötvös Llorand en Budapeŝto;
  6. por interŝanĝo de grupvizitoj kaj korespondado;
  7. por preparo de Internacia Simpozio ĉe Universitato Sorbonne en Parizo;
  8. por preparo de Monda Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj ĉe Unesko en Parizo;
  9. por preparo de ILEI-konferenco en Afriko.
- organizi la 12an konferencon en Bulgario dum 1978, eventuale kun Tejo;
  - aŭspicii internaciajn pedagogiajn seminariojn (Barlaston, Burgas, Grésillon, Gyula, Helsingör ktp.);
  - internaciigi la tendumadon en Hungario, Jugoslavujo, Ĉeĥoslovakujo, ktp;
  - limigi la daŭron de ILEI-konferencoj ĝis maksimume sep tagoj;
  - instigi la instruistojn ke ili fariĝu gastigantoj laŭ la Pasporta servo de Tejo;
  - instigi la instruistojn starigi faksekciojn de esperantistaj instruistoj interne de siaj sindikatoj;
  - instigi universitatajn profesorojn ke ili petu al la katedro pri ĝenerala kaj aplikita lingvistiko ĉe Eötvös Llorand Universitato en Budapeŝto, la okazigon de Simpozio pri interlingvistika mezurado de planitaj lingvoj;
  - instigi la sekciestrojn sendi ĝisdatigitan liston de esperantistaj instruistoj por ricevi infandeseĝnaĵojn por la Mondekspozicio de infandeseĝnaĵoj ĉe Unesko en Parizo;
  - peti de la sekciestroj liston pri la esperanto-instruistoj, kiuj jam instruas en la lernejoj, kaj kiuj kapablas gvidi alilandajn esperanto-seminariojn;
  - peti ke la sekciestroj nomigu pli frue ol la fino de Oktobro 1977a membrojn por la naŭ stud- kaj laborkomisionoj starigendaj de la estraro;
  - starigi la libroservon de ILEI por lerno- kaj instrulibroj en Pizo (Italujo) ĉe la eldonejo «La Nuova Frontiera»;
  - instigi la sekciestrojn havigi en Pizo al «La Nuova Frontiera», liston de sugestitaj lernolibroj, vortaroj kaj aliaj lerniloj kiujn oni devus havi en stoko kaj de represindaj elĉerpitaj libroj.

La konferencanoj konstatis la favoran sintenon de la landa gazetaro, radio kaj televido, kaj esprimis varman dankon al la loka organiza komitato, precipe al S-ro Albert Wickler, pro la bonega laboro farita.

## Estraro de ILEI

Prezidanto:	Rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42 D-315 Peine (Fed. Resp. Germanujo)
Vicprezidanto:	Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝto X, (Hungarujo)
Sekretario:	D-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
Vicsekretario:	S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
Kasisto:	S-ro Olle Osson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo). p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

## Sekciestroj de la Ligo

Aŭstralio:	Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840
Aŭstrujo:	Ernst Rixner, Kleingasse 6 - 18/8-13, A - 1030, Vieno
Belgujo:	G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kammelbergstraat 3-5/b.3 B-8400 Oostende
Brazilo:	Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo
Britujo:	Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester, LE9 8HH.
Bulgarujo:	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danlando:	Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnlando:	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo:	F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F.R.Germanujo:	Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn
Grekujo:	Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Ateno (816)
Hispanujo:	Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo:	Marta Cser, Zelau út. 10-14, H-1368 Budapeŝto V
Islando:	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo:	Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
Japanujo:	Fusakugu Kido-Gamon Higashi 6-51 - Kosigaja Saitama, 343
Jugoslavio:	Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
Kanado:	George du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1
Kolombio:	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo:	
Nederlando:	O. Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl
Norvegujo:	Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
Nov-Zelando:	Gwenda Sutton, 1 Wood Street, Upper Hutt
Pollando:	
Rumanujo:	
Sanmarino:	Prof. Marina Michelotti, via XXV marzo 73, I-43031 Rep. S. Marino
Sovet-Unio:	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
	Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-222-29 Lund
Svislando:	Olivier Tzaut - 2610 Mont-Soleil
Usono:	John L. Lewine. West Stockbridge, MA 01266

## Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, poŝta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přebraz
Germana D.R.:	Ludwig Schödl, Rosa-Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Luksemburgujo:	Albert Wickler, 1, rue de Kehlen, L-Olm
Malagasujo:	Prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive,
Zairujo:	Antoine-Samuel Ngangu, BP 13, Lukala (Nkandu)
F.I.M.E.M. U.E.A.	Fédération Internationale de Mouvements d' Ecole Moderne Universala Esperanto-Asocio



## **INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)**

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)

Aperas trifoje jare.

Redaktis: G. Turin  
43, rue E. Magnin  
F - 25300 Pontarlier

Konto: Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7  
Olle Olsson, Bantorget 3  
S-222 29 Lund (Svedujo)

Jara abono: 18 svedaj kronoj aŭ egalvaloro.

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI.

Nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikita konto.